

Nikolaus Lenau,

Kanlidoj

tradukita de Manfred Retzlaff

1.

Jen la suno malleviĝas
Kaj ekdormas jam la tag',
Kaj kviete enpendiĝas
La salikoj en la lag'.

Mian karulinon ie
Ne plu rajtas vidi mi.
Kan' envente tremas tie,
Fluu, larmo, fluu vi!

Lumas el la for' kun helo
En suferon mian ci,
Kiel la vespera stelo
Brilas tra l' salikoj ĉi.

2.

.....
.....
.....
.....

...

.....
.....
.....
.....

3.

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

4.

.....
.....
.....
.....

...

.....

.....

5.

Sur la lago ripozante
 Brilas lumo de la lun',
 Palajn rozojn enplektante
 En la verdan kanon nun.

Cervoj iras ĉe monteto,
 Vidas al la nokt-ĉiel'.
 Foje movas sin birdeto
 Songe en la kan-malhel'.

Pensas mi je ci kun ploro;
 Dolĉa la memor' pri ci
 Iras tra l' profund' de l' koro,
 Kvazaŭ nokte preĝus mi.

...

*Traduko de la Germana poemo "Schilflieder" de NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-676-1360 (2012-11-24 21:14:21)

Vidu ankaŭ: <http://www.zeno.org/Literatur/M/Lenu,+Nikolaus/Gedichte/Gedichte/Erstes+Buch/Sehnsucht/Schilflieder>. Pri la poeto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau.